**PILO-PRESS**
Internacia
Informservo

**Eldonanto/Herausgeber:**
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 47/76 2 dec 1976
Aperas ĉiusemajne

## Eŭropa Esperanto-Kongreso 1977

Paderborn (pp) - Laŭ informo de la Loka Kongresa Komitato de la Eŭropa Esperanto-Kongreso 1977, okazonta de la 27-a ĝis 31-a de majo 1977, jam multaj partoprenontoj el Belgio, Francio, Nederlando, Italio, Luksemburgio, Svislando, Aŭstrio kaj Federacia Respubliko Germanujo sin anoncis.

Al la LKK apartenas S-ino Traute Lawerino, D-ro Hans Kasselmann, s-ro Rüdiger Ricken kaj s-ro Horst Vorsmann.

Dum la kongreso funkcios speciala poŝtoficejo, kiu uzos porokazan poŝtan stampon.

LKK eldonis kongresan glumarkon. 1 folio kun 12 glumarkoj kostas 2,- GM. Mendojn akceptas la LKK.

La LKK dankas pro la mondonacoj ĝis nun jam ricevitaj kaj antaŭdankas al novaj donacontoj.

| Kongreskotizoj | Ĝis 31.12.76 | 31.3.77 |
|---|---|---|
| Kongresan(in)o | 21,- GM | 25,- GM |
| Edz(in)o | 13,- GM | 15,- GM |
| Studento aŭ lernanto | 10,- GM | 10,- GM |
| Infano ĝis 15 jaroj | 5,- GM | 5,- GM |

Hotelprezoj: Unulita laŭ kongresa tarifo 20,- ĝis 35,- GM
Dulita ĉambro laŭ kongresa tarifo 40,- ĝis 60,- GM

Ĉiujn pagojn oni direktu al Esperanto-Kongress, Sparkasse, D-4790 Paderborn, Konto-numero 3100 1910 aŭ al

Sparkasse Paderborn, pĉk. Hannover 5514-309 favore al Esperanto-Kongress, konto n-ro 3100 1910.

### Provizora Programo

**Vendrede, la 27-an de majo**

16,oo horo Akcepto en la urbodomo fare de la urbestro
19,00 horo Interkona vespero

**Sabate, la 28-an de majo**

9,00 horo Vizito al Kibernetika Instituto kaj FEoLL; aliaj sciencaj aranĝoj
10,30 horo Publika plackoncerto antaŭ la urbodomo
11,00 horo Vizitoj al urbo kaj muzeo
14,00 horo Oficiala malfermo
15,30 horo Fak- kaj laborkunsidoj, prelegoj, filmoj, junularaj aranĝoj
20,00 horo Balo por kongresanoj kaj gastoj

**Dimanĉe, la 29-an de majo**

9,00 horo Publika informado kaj diskutado pri Esperanto kun provlecionoj ktp.
10,00 horo Diservo subĉiela en parko
14,oo horo Jar(ĉef)kunvenoj de GEA, LEEN, LEA
20,00 horo Festvespero kun amuzaj muzikaĵoj kaj teatraĵoj kaj kun la magiisto "Trixini"

Lunde, la 30-an de majo

9,00 horo Ekskurso en la Teŭtoburgan Arbaron
13,30 horo Komuna manĝo de Vestfalia Ŝinko kaj aliaj vestfaliaj specialaĵoj
15,00 horo Plurlanda renkontiĝo, vizito al la urbo
Vespere Folklora vespero kun vestfaliaj dancoj

Marde, la 31- an de majo

9,00 horo Tuttaga ekskurso al Weserbergland (montar-regiono de la rivero Weser)

Kongresejo estas Paderhalle

Korespondadreso de la LKK: D-ro Hans Kasselmann, Falkenweg 10, D-4790 Paderborn, F R Germanujo, tel. (05251) 61 958

**************************

Jubileo kaj Zamenhof-Festo en Bremen

La Esperanto-Grupo Bremen invitas al Zamenhof-Festo en la kunvenejo Bremen Findorffstr. 13, Bundesbahngebäude, la 8-an de decembro 1976, je la 20,15 horo.

El la pogramo: Solena transdono de la ekzamen-atestoj
Elekto de la plej belaj fotoj pri la ĉi-jaraj grupaj entreprenoj kaj disdono de premioj por la tri elektitaj bildoj

Lige kun la Zamenhof-Festo la grupo povas festi la 70-an datrevenon de la fondiĝo de la Grupo Bremen.

Festprelego: Sep jardekoj da Esperanto-Grupo Bremen

******************

Klubeja inaŭguro

Augsburg (pp) - Esperanto-Grupo Augsburg invitas al inaŭguro de ŝia nova klubejo en Ausgburg-Oberhausen, Seitzstr. 14, dimanĉe, la 5-an de decembro 1976, je la 14-a horo.

Programo 10-a ĝis la 12-a horo Informhoroj por la publiko

14-a horo: Saluto, transdono de atestoj por kurspartoprenintoj
Honorigo de s-ro R. Kratzmann pro longjara membreco
Retrorigardo al la Germana Esperanto-Ekspozicio 1976 per Diapozitivoj - Komuna kaftrinkado

++++++++++++++++++

Ĝemeliĝa urbo serĉata

Saintes (pp) - La esperantistoj de la franca urbo Saintes serĉas kontakton al germanaj esperantistoj cele de ĝemeliĝo de Saintes kun germana urbo. Saintes, en sudokcidenta Francio, nur 25 km for de la urbo Cognac, estas malmulte industria, vivas ĉefe de agrokulturo, kies ĉefa parto estas la fabrikado de Konjako. La urbo nombras 30 000 enloĝantojn. Kontaktemuloj skribu al s-ro J. Manceau, Lormont Haut, Fontcouvert, F-17 100 Saintes, Francio.

Pri Eŭropa Klubo

Paderborn (pp) - Dum la jarkunveno de la Eŭropa Klubo ĵus okazinta en Paderborn, Hermann Behrmann estis reelektita kiel prezidanto.

Interlingvistika laborkonferenco

Paderborn (pp) - 70 sciencistoj el 14 eŭropaj kaj aziaj landoj diskutis de la 24-a ĝis la 28-a de novembro en la Esplorcentro FEoLL Paderborn pri demandoj de konstruiva lingvoscienco. Entute estis faritaj 36 referaĵoj, parte en la germana lingvo, parte en Esperanto.

La prelegoj temis pri lingvokibernetiko, internacia scienca komunikado, lingvopedagogiko kaj pri la lingva ebleco de mondliteraturo. La tekstoj de la prelegoj aperos venontjare en unu volumo en la eldonejo Schroedel kaj Schöningh.

La laborkonferenco akceptis plurajn rezoluciojn, kiuj rilatas al la akcelado de la interlingvistiko, forte neglektata ĝis nun en F R Germanujo, al akcelado de lingvo-orientiĝa instruado kaj de la planlingva instruado, kaj al la uzo de la internacia lingvo kiel aldona laborlingvo en internaciaj sciencaj kaj aliaj kunvenoj.

Abonoj al revuoj 1977

Eŭropa Dokumentaro, periodaĵo de Centro por Eŭropa Edukado, Bruselo
Jara abonkotizo por 4 numeroj 14,50 GM

Biblia Revuo, trimonata internacia gazeto pri bibliaj kaj orientaj studoj
Jara abono 18,- GM

Juna Amiko, internacia lerneja revuo
Jara abonkotizo por 3 numeroj 3,- GM

Abonu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, 8500 Nürnberg 1
PSchK Nürnberg 819 56-851, Stadtsparkasse Nürnberg 1.910.579

Esperanto en Radio

Varsovio. Ni jam kelkfoje konstatis, ke la Esperanto-Redakcio de Pola Radio ricevas relative multajn korespondaĵojn de aŭskultantoj, inter 100 - 150 ĉiusemajne. Tamen la nombro de korespondaĵoj povus estis pli granda, se ĉiu aŭskultanto minimume unufoje en la monato skribus al la redakcio (Kompreneble tio validas ankaŭ por la aliaj stacioj kiuj elsendas en Esperanto!)

Preskaŭ neniujn reagojn la redakcio ricevas pri la Esperanto-anguletoj kadre de naciliingvaj programoj. La Esperanto-anguletoj estas la "zorginfanoj" de la redakcio. Des pli ĝojige estas la fakto ke kadre de la germanlingva programo la dimanĉa anguleto nun estas aŭdebla 3-foje ( vidu PP N-ro 45/76, p. 3 ). Plej bone aŭdebla estas la anguleto en la matena horo, je la 6,30 horo, sur ondo 200 m. En la elsendo de la 21.11.76 Jerzy Grum citis kaj komentis la informon pri la interparoloj de s-ino Bormann en Bonn (PP 44/76) kaj en la elsendo de la 28.11.76 Barbara Pietrzak recenzis la novan numeron de Aŭstria Esperanto-Revuo. Estus vere dezirinde, ke multaj germanlingvaj esperantistoj aŭskultus kaj reagus al tiuj Esperanto-anguletoj, ĉar fakte ĉi-tie Pola Radio plenumas taskon (informadon pri la Esperanto-movado en germanlingvaj landoj), kiun devus fari la koncernaj landaj radio-stacioj.

Zagrebo. Bone aŭdebla ĉiam estas la Esperanto-programo meznokta de Zagrebo. En la pasinta elsendo oni donis respondojn al niaj korespondantoj kaj priparolis ricevitajn E-periodaĵojn. Kompreneble ne mankis la konstanta programero "Novaĵoj el Jugoslavio".

La Svisa Kurtonda Servo i.a. emisias ĉi-semajne prelegon de A. Baur pri la svisa ŝiparo.

# Konkurso de Pola Radio

10-tagaj ekskursoj tra Pollando

Valoraj objektaj premioj

estas akireblaj de niaj aŭskultantoj kaj legantoj, kiuj donos respondojn al jenaj demandoj:

1) Kiujn polajn artiklojn oni povas aĉeti en via lando kaj kiel vi pritaksas ilin? Kiuj polaj artikloj (produktoj) ĝuus tie sukceson?

2) Kiel vi vidas la perspektivojn de la plua evoluo de la kunlaboro de via lando kun Pollando? Kio, laŭ via opinio, influis aŭ povus kontribui al plivastigo de tiu ĉi kunlaboro?

3) Kiel vi pritaksas la servan agadon de polaj transportaj entreprenoj (Polaj Aer-Linioj "LOT", Polaj Oceanaj Linioj, Internacia Aŭtomobila Transportado "PEKAES", Polaj Ŝtataj Fervojoj) kaj de la Turisma Oficejo "ORBIS"?

Respondo jam al unu el la supraj demandoj rajtigas al partopreno en lotado de la premioj.

La leterojn ni petas sendi laŭ la adreso:

Pola Radio, Esperanto-Redakcio, PL-00-950 Warszawa 1, Poŝtkesto 46, Pollando - en kovertoj signitaj per la devizo: "Konkurso", ĝis la 31-a de decembro en la 1976-a jaro (decidas la dato de la poŝta stampo).

La rezultojn ni anoncas en la disaŭdigoj de la Pola Radio por Eksterlando la 31-an de januaro en la 1977-a jaro kaj en la marta numero de la monatrevuo "Polska" (Pollando).

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la organizantoj de la konkurso.

Ni deziras bonŝancon en la lotumado de la premioj.

Partoprenu la konkurson mem kaj partoprenigu aliajn!

Polskie Radio Warszawa

Pola Radio disaŭdigas trifoje ĉiutage en Esperanto:

| | | |
|---|---|---|
| 6,00 horo | ondolongoj: | 41 m, 49 m, 75 m, 200 m |
| 16,30 horo | ondolongoj: | 25 m, 31 m, 41 m |
| 22,30 horo | ondolongoj: | 41 m, 49 m, 75 m, 200 m |